EKO 2022 Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler


**ENHAVO n-ro 37>** ● Premio de ILEI ●Sŭahile ● Vroclave ● Svise ●TEJO **< julio 4**

## Premio La Torre 2022 asignita

ILEI anoncas, ke la gajninto de Premio La Torre 2022 estas Nitta Takamichi el Japanio. La titolo de la brila esplor-raporto estas “Instrumetodo por Esperanto-kurso bazita sur metakognado kaj aktiva lernado”. Vi povas legi ĉi tie la finan raporton de la internacia ĵurio el ses landoj:

https://www.ilei.info/novajxoj/Raporto-pri-la-jxuria-kunsido-de-Premio-La-Torre-2022.pdf

La ceremonio por la premio okazos dum VEKI-3 (la virtuala kongreso de ILEI), dimanĉon la 24an de julio 2022 je la 9:00 UTC, kun prelego de Renato Corsetti pri la karmemora profesoro Maŭro La Torre kaj kun la ĉeesto de reprezentantoj de Familio La Torre kaj de la ĵurio. De la 10:00 UTC sekvos unu-hora prelego de Nitta Takamichi pri siaj esplorado kaj instrumetodo. Vi povas aliĝi ĉi tie: https://forms.gle/BcFUQPyxrF8Hpnr4A

Esperante vidi vin tiam, mi sendas elkorajn salutojn,

Alessandra Madella, estrarano de ILEI.

## Sŭahila kurso de prof Nino Vessella

Spektu la rilatan filmon en la jutuba kanalo de UEA:
https://www.youtube.com/watch?v=zhWPgn9sUTE

## Pola kurso en la renoma Vroclavo

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Baza kurso por novaj klubanoj
Gvidantonomo: Miĥaelo Rikardo Balicki
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Vroclavo, Pollando

Aldoninto: mbalicki

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27429

## Svisa ILEI-sekcio proponas septembran seminarion

La svisa ILEI-Sekcio vigliĝas kaj proponas al vi **seminarion** en sabato 10-a de septembro aldone al la StudSabato kutima, do de la 16-a horo ĝis la 17,30, en CDELI. La temo estos **ĉu korekti, kiel korekti?** Ne temas nur pri korektado farita de instruisto, sed ankaŭ

pri kongresaj situacioj, kiam iu aŭdas eraron ĉe alia persono kaj pripensas: ĉu mi diru ion? Prelegos Mireille Grosjean, lingvo-instruistino kaj eksprezidanto de ILEI kun ebla kontribuo de Monika Molnar. Do la seminario estos por ĉiuj!

## 'Aikideo' – bona ideo konigi nian lingvon



La organizo "Martial Arts Studies" (esploroj pri luktartoj) ekigas hodiaŭ tritagan kongreson en la urbo Lausanne pri Luktartoj kaj Tutmondiĝo. Vendrede Mireille Grosjean prelegos pri la ligoj inter Aikido kaj Oomoto, kiu enkondukis Esperanton en 1923. La fondinto de Aikido kaj Onisaburo Deguchi vivis kiel fratoj dum 20 jaroj. Mireille Grosjean kaj D-ro Christoph Klawe kunlaboras de jaroj pri tiu temo: Aikideo.
Retpaĝo estis kreita. www.esperanto-aiki.de



## Homoj en historia hungara foto nomitaj

La foto estas el jaroj 1962-1963 (kiun SMG jam iam dissendis).Vigle debatas ion Julio Baghy, meze d-ro István Bácskai kaj prof. d-ro K.Kalocsay. La kvara persono estas s-ano Lajos Kökény.

I.Ferenczy kun aldonaj informoj de Eva Tofalvy

## La kantisto intervjuas la redaktoron – rol-inversigo!

Nova filmeto. Mikaelo Bronŝtejn intervjuas redaktoron Dima Ŝevĉenko en Esperanto: https://youtu.be/-Y8Ln3AsvU4
Bonvolu spekti, ŝati, dividi kaj aboni la kanalon. Baldaŭ aperos ankoraŭ multaj interesaĵoj.


Dima kaj Anna

## KODEJO 2020– TEJO esploras pri siaj membroj


**Pretigis kaj redaktis**
Albert Stalin Garrido (la estrarano pri landa agado)
**Reviziis**
Arya Bhaskara Ferduzi
Patrício Agustin Iglesias
Tyron Surmon
Lenka Doškářová
**Kovrilpaĝon kaj paĝokapon desegnis**
Ariel Palmer

tejo KODEJO

# TEJO per ses grafikaĵoj kaj tri rekomendoj




*Grafiko 5. Organizoj laŭ ofteco de estraraj kunvenoj*




*Grafiko 6. Tipoj de eventoj organizataj de junularaj organizoj*





*Grafiko 8. Rilatoj kun samlandaj nejunularaj organizoj*




*ko 15. Ofteco de la okazigo de retaj eventoj en 2020 dumpandemie*




*Tipoj de retaj komunikiloj uzataj de organizoj por alekstera informado*




## 5.1. Ĝeneralaj Rekomendoj pri Funkciado

Rekte vidinte la profundajn efikojn de la pandemio sur la funkciadon de junularaj organizoj kaj ankaŭ la centran dum-pandemian rolon de reta agado, la Komisiono firme rekonas la daŭripovon kaj la relativan inkluzivemon de reta agado. Ĝi instigas la Organizon ĝenerale kiel tegmentan organizon, ke ĝi daŭre kunlaboru kun landaj kaj fakaj organizoj kaj instigu ilin al pli aktiva, seninterrompa organizado de retaj eventoj en la venontaj jaroj por teni sian tutmondan aktivulan reton interkonektita kaj aktive kunlaboranta kaj ankaŭ demokratiigi aliron al kernaj organizaj servoj kaj decidoj. Samtempe, tamen, por atingi tiun celon TEJO samtempe devas daŭre provizi junularajn organizojn per ĉiaj subtenoj teknikaj. Ĉiuj

komisionoj de TEJO estas same kuraĝigataj, ke ili adoptu iniciatojn, kiuj estu retaj kaj taŭgaj al partopreno de aktivuloj el diversaj kontinentoj.

## 5.2. Ĝeneralaj Rekomendoj pri Informado kaj Varbado

La Komisiono rekomendas al landaj kaj fakaj organizoj, ke ili daŭre aktive informu pri sia agado kaj varbu novajn membrojn pere de retaj kanaloj, kaj se cirkonstancoj jam ebligas tion, denove per fizikaj, surlokaj ebloj. Kvankam en pluraj landoj la intenseco de la pandemio komencis malfortiĝi kaj tiel oni ekrajtis denove okazigi surlokan agadon, organizoj tamen strebu al ekvilibro inter fizikaj kaj virtualaj agadterenoj —kun emfazo sur pluan tenadon de reta agado —kaj tiel maksimume atingi la junularon. Subtene al tiu celo, TEJO, per siaj homfortoj (interalie, sia oficisto pri merkatiko), estas preta por disponigi helpon al landaj kaj fakaj movadoj, i.a. per kreado de taŭgaj grafikaĵoj, publikigo de afiŝoj kaj anoncoj en siaj sociaj retejoj, aŭ alispeca teknika subteno.

## 5.3. Ĝeneralaj Rekomendoj pri Financoj

La Komisiono rekomendas al la koncernaj organoj kaj oficŝavantoj ene de TEJO, interalie al la Kasisto, la dungitaj subvencipetantoj, aŭ aliaj respondeculoj pri projektoj kaj subvencioj, ke ili kunlaboru rekte aŭ nerekte kun landaj kaj fakaj organizoj ne nur por pli klare prilumi la situacion, sed ankaŭ por proponi konkretajn solvojn kiuj enkondukas organizojn en daŭripovan financan kreskon. Kasistoj, reviziantoj, kaj respondeculoj pri projektoj kaj financoj de landaj kaj fakaj junularaj organizoj povus interŝanĝi spertojn kaj bonajn praktikojn rilate financojn, kaj ĝuste oportunojn por tio devas ebligi TEJO kiel la tegmenta “alianco.” Ekzistas taŭgaj helpiloj pri subvencipetado (kiel en la Aktivula Akademio), kaj surbaze de tiuj materialoj, la spertuloj en la TEJO-teamo pripensu okazigi kapabligon kune kun koncernaj respondeculoj de landaj kaj fakaj organizoj.

========= vortoj:  860 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj al la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Ĉu dumil entute, kun plusendoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.